
No 02
1969

G.L. GIMELLI

# ITALA fervojisto

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti





IFEA

## 21-a I.F.E.F.-KONGRESO EN AVIGNON

De la 17-a, ĝis la 23-a de majo 1969-a

Oficiala adreso: 21-a IFEF-Kongreso, 15 rue Guillaume Puy, F-84 AVIGNON.

Bankkonto: Banque Nationale de Paris, F-84 Avignon, 39 rue de la République. Compte CH 072574-Congrès des Cheminots Espérantistes.

Poŝtĉekkonto: Banque Nationale de Paris, Compte 13381 Marseille. Aldonu C. CH 072574-Congrès des Cheminots Espérantistes.

Kongresejo: Palais de Champfleury, AVIGNON.

Kongres-kotizo: Ĝis la 20-a de aprilo 1969: 50 francaj frankoj. Pensiuloj, familianoj, junuloj malpli ol 28 jaroj pagas la duonon. Ĉiuj aliĝiloj devas atingi L.K.K. plej malfrue la 20-an de aprilo.

Simbola aliĝo: Minimume 12 francaj frankoj. Tiuj personoj ricevos folion da glumarkoj kaj laŭeble kongresinsignon kaj kongreslibron.

Ekskursoj: a) Tuttaga ekskurso per aŭtobuso al suda marbordo tra Camargue kaj kun vizito de urbo ARLES. Prezo 38 f.f. inkluzive tagmanĝon.
b) Duontaga ekskurso per aŭtobuso al FONTINE-DE-VAUCLUSE kaj vizito al urbo ORANGE. Planita vendrede. Prezo 10 f.f.
c) Duontaga ekskurso per aŭtobuso al urbeto UZES kaj PONT DU GARD (famkonata romia akvedukto). Planita lunde. Prezo 8 f.f.

Manĝado: Prezfavoraj manĝoj kun trinkaĵoj riceveblaj kontraŭ kuponoj aĉeteblaj en la kongresejo, po unu 8 f.f. (ĉio inkluzive).
Bankedo planita marde tagmeze en la kongresejo je la prezo de 26 ff.

Loĝiĝo: L.K.K. rezervas ĉambrojn por aliĝintaj kongresanoj kiuj pagis la ĉambroperadon de 2 f.f. po lito. Diversaj kategorioj de 12 ĝis 30 f.f. Komuna loĝejo en Kulturdomo (limigitaj lokoj): 4,30 f.f. po lito.

Filmvespero: Bela filmo pri la regiono titolita "Images rhodaniennes" kaj tri interesaj fervojaj kolor-filmoj temantaj pri la francaj rapidtrajnoj kaj iliaj elprovoj.

Teknika vizito: Planita marde matene en la lokomotiva remizo.

Aliĝado: Bonvolu mencii ĉu vi partoprenos la ekskursojn aŭ ne, eĉ se vi ne pagas ilin samtempe kun la aliĝo. L.K.K. bezonas tiun informon kaj ne povos garantii lokon al tiuj, kiuj ne anoncis sin. Tiuj, kiuj jam sendis ne kompletan aliĝilon povas informi la L.K.K. pri ilia intenco partopreni ekskursojn.

SKIZO DE LA PROGRAMO POR LA 21-a KONGRESO DE I.F.E.F.

Vendredon la 16-an: Gazetara Konferenco.

Sabaton la 17-an: Kunsido de IFEF-Estraro kun la LKK. Interkona kunveno. Teatra prezentado.

Dimanĉon la 18-an: Diservoj. Solena malfermo de la Kongreso. Komuna fotado. Distra posttagmezo. Internacia balo.

Lundon la 19-an: Komitata kunsido. Vizito de la papa Palaco (unua). Duantaga ekskurso per aŭtobuso (Uzés kaj Pont du Gard). Diversaj Komisionoj: junulara, fakprelega, terminara. Folklora vespero.

Mardon la 20-an: Kunsido publika. Vizito de la papa Palaco (dua). Bankedo. Piedpilkmaĉo. Fakprelego. Filmvespero (teknika kaj turisma).

Merkredon la 21-an: Tuttaga ekskurso per aŭtobuso (Arles kaj Camargue).

Ĵaŭdon la 22-an: Kunsido publika. Vizito de la lokom. deponejo. Junulara vesper.

Vendredon la 23-an: Duontaga ekskurso (Fontaine de Vaucluse kaj Oranĝe).

La tagordojn de la diversaj kunvenoj vi trovas en "La Internacia Fervojisto"

## TRILANDA RENKONTIĜO EN ARNOLDSTEIN (AŬSTRIO)

La Aŭstria Esperantista Federacio-Landgrupo Karintio kaj la estraro de Aŭstria Federacio Esperantista Fervojista-AFEF, invitas la najbarajn jugoslavajn, italajn kaj aŭstrajn E. kaj esperanto-societojn, kore kaj samideane al la TRILANDA RENKONTIĜO okazonta paske, la 5-an kaj la 6-an de aprilo 1969, en la trilanda angulo: Aŭstrio-Jugoslavio-Italio, en ARNOLDSTEIN (Aŭstrio).

Pluajn informojn volonte donas la aranĝanto: S-ro Martin STUPPNIG, A-9601 ARNOLDSTEIN 175 (Aŭstrio).

## EN COMO LA 40-a ITALA KONGRESO DE ESPERANTO

ALIĜKOTIZOJ: Kongresano membro de I.E.F.: Ĝis la 30-4-1969 £.3000. Poste £.4000. Kongresano ne membro de I.E.F.: Ĝis la 30-4-1969 £.4000. Poste £. 5000. Junuloj ĝis 25 jaroj: Ĝis la 30-4-1969 £.1500. Poste £.2000. Familianoj: Ĝis la 30-4-1969 £.2000. Poste £.2500. Por la eksterlandaj esperantistoj la aliĝo al la Kongreso estas senpaga. Pagoj ĉe poŝtĉekkonto 18/5542 je la nomo "CONGRESSO ESPERANTO-COMO".

PROVIZORA PROGRAMO: Vendredon la 12-an de septembro 1969: Gazetara Konfer.
Sabaton la 13-an: Alveno de kongresanoj. Disdono dokumentoj: Enhoteligo.
Vespere: Interkona vespero.
Dimanĉon la 14-an: Matene: Religiaj Diservoj en Esperanto. Oficiala Inaŭguro de la Kongreso. Honora vermuto. Ĝenerala fotografado.
Posttagmeze: 1-a Ĝenerala Asembleo de IEF. Fakaj kunsidoj. Libera vespero.
Lundon la 15-an: Matene: 2-a Ĝenerala Asembleo de IEF. Fakaj kunsidoj.
Posttagmeze: Daŭrigo kongresaj laboroj. Turisma vizito de la urbo.
Vespere: Teatra kaj koncerta vespero.
Mardon la 16-an: Matene: Eŭropa Tago: Kunsido pri eŭropaj problemoj.
Posttagmeze: Daŭrigo kongresaj laboroj. Turisma vizito de la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj.
Vespere: Kongresa Balo.
Merkredon la 17-an: Matene: Daŭrigo kaj konkludo kongresaj laboroj. Rezolucioj.
Posttagmeze: Ŝipa ekskurso sur la lago.
Vespere: Oficiala bankedo en Bellagio kaj reveno al Como per ŝipo.
Ĵaŭdon la 18-an: Ekskursa tago.

## 11-a EUROPA FERIO-SEMAJNO EN SVISLANDO

La bonega akcepto kaj la multnombraj gepartoprenantoj dum la jubilea renkontiĝo instigis nin realigi la 11-an E.F.S.-n ree en GWATT ĉe la lago de Thun, de la 24-a ĝis la 30-a de aŭgusto 1969. Jen nia nova programo por 1969:
Dimanĉe 24-8-1969: Kolektiĝo je h.15,15 sur kajo 1 de la stacidomo Thun. Komuna vizito al la historia urbo. Poste veturo per trajno al Gwattstutz je la h.17,19. Enloĝiĝo, vespermanĝo, interkona vespero.
Lunde: Antaŭtagmeze libera. Posttagmeze trajnekskurso al Kander-valo kaj vizito al ĉarma Blausee (blua lageto). Rondveturo. Vespere: lumbildprezentado.
Marde: Tuttaga ekskurso per trajno al Simmer-valo. Supreniro sur Rinderberg (2008 m.). Belega rondvido sur la alpoj. Ebleco por migradi tra la alpa her.
Merkrede: Vizito al la belega ferioloko Spiez. Agrabla ŝipveturado sur la lago de Thun kaj neforgesebla ekskurso per funikularo kaj seĝo-terfero al Beatenberg-Niederhorn (2000 m.). Vespere: aktuala prelego.
Ĵaŭde: La kulmino de nia semajnaranĝo: Lauterbrunner-Grütschalp-Mürren. Saniga migrado de la Grütschalp ĝis Mürren. Estos ankaŭ fervojeto je dispono. Posttagmeze ebleco veturi per telfero al la grandioza elvidejo Schilthorn.
Vendrede: Libera tago por akvosporti aŭ ekskursi propravole. Adiaŭa vespero.
Sabate: Veturo trajne laŭlonge de kvin lagoj kaj trans la Brünig-pasejon al konata urbo Lucerno. Komuna tagmanĝo kaj vizito de la urbo..Fino.
Aranĝprezo por pensiono, ekskursoj kaj tranoktoj en la Kandomo (Schilfhaus) en trilita ĉambro sv.fr.200. Gejunuloj (sub 16 jaroj) rabato de sv.fr.30.
Anoncoj pere de poŝtkarto al s-ro Ernst Glättli, Laurstrasse 17, CH-5200 BRUGG (Svislando), indikante: ĉu s-ro, s-ino aŭ f-ino; familia kaj voknomo, naskiĝdato; metio; kompleta poŝtadreso; dezirata dormejo (ĉu tri- aŭ dulita ĉambro en Kandomo (Schilfhaus) aŭ Arbardomo (Waldhaus). Tiu lasta pli luksa kun balkonoj en dulitaj ĉambroj kun alpago po persono de sv.fr.45.

## NOVA FALDFOLIO PRI BOLOGNA

Danke al la klopodoj de la Provinca Turisma Entrepreno, aperis nova faldfolio pri la urbo Bologna en Esperanto. Ĝi estas sufiĉe bela kaj prezentas la ĉefajn verkojn kaj monumentojn de la urbo facile troveblaj sur la mapo per numeroj. Ĝi enhavas belajn fotojn kaj utilajn adresojn. Estas senpage ricevebla ĉe: ENTE PROVINCIALE DEL TURISMO, Via Marconi, 45 I-40122 BOLOGNA aŭ ĉe: I.F.E.A., Via Donato Creti, 61 I-40128 BOLOGNA (Italio). Petu ĝin amase!

## 54-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Helsinki, 26 julio-2 aŭgusto 1969

Alta Protektanto: D-ro Urho Kaleva Kekkonen, Prezidanto de Finnlando.
Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.
Infana Kongreseto: La 11-a Internacia Infana Kongreseto okazos en la kadro de la 54-a U.K. Aliĝkotizo: 50 ned.gld. Aliĝiloj riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.
Dua Bulteno: Rekorde frue aperis Dua Bulteno, kiu en kartona kovrilo kunigas faldfoliojn kun ĝeneralaj informoj kaj mendiloj por loĝado, ekskursoj, oficiala postkongreso en Turku kaj bankedo. La Duan Oficialan Bultenon ricevis ĉiu aliĝinto al la Kongreso, kune kun speciala atestilo, kiu ebligas rabaton je aĉeto de dudirekta fervoja bileto por vojaĝo al Helsinki.
Finna Vespero: En la Kongresa programo troviĝos aparta Finna Vespero, kiu verŝajne konsistos i.a. el finna popolmuziko, popolaj kantoj en Esperanto, kantado de laponoj kaj prezento de ekstraktoj el "Kalevala".
Oficiala Postkongreso: okazos en Turku de la 2-a ĝis la 6-a de aŭgusto. Prezo: 155 ned.gld.,ĉion inkluzive. Detalaj kaj mendilo en la Dua Bulteno.
Honora Komitato: Al la Honora Komitato de la Kongreso aliĝis dek eminentuloj de la finna publika vivo, i.a. la Ministro por Publika Instruado, S-ro Johannes Virolainen.
Ministeria invito fruktodona: En januaro vizitis Finnlandon laŭ invito de la Ministerio por Eksterlandaj Aferoj la redaktoro de "Esperanto", d-ro V. Sadler. La invito celis helpi al diskonigo de la kongreslando kaj de la Kongreso mem per artikoloj en la Esperanta gazetaro. Samtempe la vizito servis por intensigi la informado pri la Kongreso kaj pri la Internacia Lingvo en Finnlando mem. En ligo kun ĝi aperis pluraj metroj da interviuoj en la finna kaj svedlingva gazetaro kaj du televidelsendoj.
Statistiko: Ĝis la 27-a de januaro aliĝis entute 942 personoj el 33 landoj.

## "MIELA LUNO" EN RIMINI - KONKURSO POR JUNAJ GEEDZOJ

-La Turisma Entrepreno kaj la Asocio de Hotelestroj organizas konkurso "miela luno" en Rimini, kiu rajtos partopreni ĉiuj junaj geedzoj, kiuj ne atingos la 35-an jaraĝon je la 20-a de majo 1969.
-La premioj konsistas el 10-tagaj senpagaj restadoj en unuaklasaj hoteloj de la marbordo de Rimini (Italujo). Dum la restado oni aranĝos apartajn festojn, ekskursojn kaj regalojn honore al la paroj. La restadperiodo estas fiksita de la 25- de majo ĝis la 5- de junio 1969.
-La konkursantoj, plej malfrue ĝis la unua tagdeko de la venonta majo, devos sendi la plej belan foton de la edzino kun edziĝa vesto, kaj concize respondi al unu el ĉi tiuj demandoj: "kio estas la motivo de via feliĉo" - "rakontu la plej kuriozan epizodon de via edziĝa vojaĝo" - "kiu kvalito de via edzo plej ĉarmas vin" - "kiu difekto de via edzo estas plej simpatia kaj karakteriza".
-Tiucele komisiono plenrajte juĝos kaj premios fotojn kaj respondojn. Tute ne temos pri elekto de vesto plej riĉa aŭ luksa sed simpla kaj samtempe eleganta, kiu pruvos la personan bonguston de la edzino.
-Oni adresu ĉion al: Albino Ciccanti-26 San Bernardino-47037 RIMINI (Italio)

## FERIU EN JUGOSLAVIO

### INTERNACIA ESPERANTA FERIO-CENTRO VOLPARIJA-JUGOSLAVIO

Volparija situas meze de pina arbareto, sur la okcidenta marbordo de la duoninsulo Istrio, kun milda mediteranea klimato kaj vegetaĵaro, kiu prezentas al la gastoj agrablan kaj trankvilan ripozon. I.E.F.C. disponas pri tri vilaoj kun entute 150 litoj en 2-3-litaj ĉambroj. Propra strando kun cementita plato por sunumado. Bansezono: de la 15-a de majo ĝis fino de septembro

La administranto kaj kelnero parolas Esperanton!

Ekzistas eblecoj por ekskursoj al Portoroĵ, Koper, Postojna (mondfamaj grotoj), Lipica (mondfama ĉevalbredejo), Poreĉ, Pula, al proksima Italio ktp

Kompleta pensiono kostas de 2,60 ĝis 3,60 Usa dolaroj aŭ egalvaloro. Por grupoj specialaj kondiĉoj! Postulu senpagajn prospektojn!

Invitas vin:I.E.F.C.de Esperanta Societo, Ljubljana, P.f.401, Jugoslavio.

## PREMIO FERREUROPA 1969-a

La itala sekcio de "Association Européenne des Cheminots-A.E.C.", anoncis konkurson titolitan "PREMIO FERREUROPA". Ĝi estas rezervita al ĉiuj Fervojistoj kaj iliaj gefamilianoj enskribitaj al AEC, al "Eŭropa Federacio de interamikiĝo de Staciestroj" kaj al "Internacia Fervojista Esperanto-Federacio-I.F.E.F.". Konkursa temo: pentraĵa aŭ grafikaĵa verko por afiŝo kies temo estas: "Fervojista Kunlaboro por Eŭropa Unuiĝo". Ĉiu povas partopreni per unu sola verko, kiu havos tiujn dimensiojn: maksimume, larĝeco cm.40 kaj alteco cm.50; minimume, larĝeco cm.25 kaj alteco cm.30.

Oni asignos la sekvantajn premiojn: 1-a Premio: £.80.000 kaj diplomo - 2-a Premio: £.50.000 kaj diplomo-3-a Premio: £.30.000 kaj diplomo kaj aliaj.

La verkoj, kiuj ne devas esti partoprenintaj al antaŭaj konkursoj aŭ ekspozicioj, devos esti sendotaj per registrita poŝto antaŭ la 30-a de aprilo 1969-a al jena adreso: Ĉefstaciestro Gennaro GRANITO, Stazione F.S. SAN MARCELLINO (Caserta). En la malantaŭa parto de la verko oni devas skribi, tajpe, bapton kaj familian nomon, adreson kaj membrokartan numeron de nacia filio de I.F.E.F. aŭ de aliaj du Asocioj.

La tri unuaj verkoj premiitaj restos propraĵo de A.E.C.; la restantaj estos resendotaj al la verkistoj je zorgo kaj elspezo de la Asocio mem.

La 25-an de majo 1969-a en Napoli oni disdonos la premiojn okaze de la "TAGOJ DE EŬROPAJ FERVOJISTOJ".

## N I   L E G I S

ESPERANTA ŜAKO. Oficiala Organo de Esperanta Ŝak-Ligo Internacia, ĉe Vinicio Bussacchetti, 10082 COURGNE' (Italio): Dekkvin paĝa revueto stencilita pri turniroj kaj problemoj de la Ŝakludado.

ĈEĤOSLOVAKIO-LA GROTOJ. Bunta, eleganta faldfolio prezentas la plej belajn grotojn de la lando. Eksterordinaraj formacioj ĉu glaciaj, ĉu gutŝtonaj, prezentas vidaĵojn ĉiam malsamajn, ĉiam imponajn, ĉiam fabelajn.

Vizitu ilin! Vizitu Ĉeĥoslovakion!

MÜNCHEN. Bela faldfolio kun granda mapo de la urbo kaj fotoj kaj priskribo de la plej interesaj vidindaĵoj kaj monumentoj. La ĉefurbo de Bavario estas tre loga: ĝi altiras turistojn per la simpatio kaj gajeco de siaj enloĝantoj, per la ĉarmo de siaj montrofenestroj, per la riĉeco de siaj monumentoj, per la famo de sia teknika muzeo kaj precipe per sia...tre bongusta biero. Eldonita de:Fremdenverkehrsamt der Landeshauptsadt MÜNCHEN 2,Rosental 1 (Germ.)

VOLPARIJA, Internacia Esperanta Ferio-Centro Volparija-Esperanta Sociato Ljubljana. Por stimuli internaciajn kontaktojn kaj samtempe ĝui maron kaj sunon, Volparija, situata meze de pina arbareto, sur okcidenta marbordo de duoninsulo Istria, estas taŭga feria loko. Por ricevi informojn pri malmultekostaj ferioj turnu vin al: I.E.F.C.-Esperanta Societo, Tavcarieva, 2/I LJUBLJANA (Jugoslavio).

ESPERANTO GAZETO. Organo de INTERNACIA INSTITUTO POR OFICIALIGO DE ESPERANTO (IOE). Servas al la enkonduko de Esperanto en la praktikon.Tial ĝi informas, amuzas, stimulas, organizas... 10 fojojn jare. En ĉiu numero donaco: nova amuza bildserio de AŬDVIDA METODO de Esperanto-kurso.

La abonprezo restos ankaŭ por 1969 $2 aŭ egalvaloro. Abonu ĉe: D-ro Giov. MARCHIORI, via Cantore 15 (Galleria Asta) 37100 VERONA. Aŭ ĉe ESPERANTO-GAZETO, Zetska 4-A, BEOGRAD, Jugoslavio.

## E S P E R A N T O   E N   L A   R A D I O

RADIO ROMA-ESPERANTO-Casella Postale 320, I-00100 ROMA. La dissendoj okazas de h.21 ĝis 21,20 (M.E.T.). Fakestro: D-ro Renato CORSETTI. Ondlongoj: metroj 25,42; 30,90 kaj 41,24. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto", la unua parto al la ĉi-subaj temoj:

MAJO 1969-a: Dimanĉon la 4-an: Tra la literaturo. 11-an: Novaĵoj el Italujo. 18-an: Italaj kanzonoj en Esperanto. 25-an: Leterkesto.

JUNIO 1969-a: Dimanĉon la 1-an: La franca verkisto Chateaubriand kaj Italujo. 8-an: La Dolomitoj inter realo kaj legendo. 15-an: La Palaco de la Kongresoj en Florenco. 22-an: La arkitekto Bramante. 29-an: Kristana Mondo.